

Kulturperanta samurajo

KOBAYASHI Tsukasa

Universala Esperanto-Asocio

Nitobe Inazô naskiĝis en Morioka, norda distrikto de Japanio, en 1862. Li fariĝis kristano en 1877. Li decidis esti ponto inter kontinentoj, perante ideojn kaj kulturojn inter Oriento kaj Okcidento.

Li studis agrikulturan ekonomion en universitatoj en Tokio, Usono kaj Germanio. En Usono, en 1884, li renkontis la kvakerismon kaj ekkonis f-inon Mary Erkinton, kvakeristino kun kiu li geedziĝis en 1891. Tial el kvakerismo li kompreneble ricevis grandan pacifisman influon.

D-ro Nitobe verkis famekonatan libron *Bushido* (1899) en la angla lingvo. Japanlingve *buŝido* signifas la ideon de samurajo, iom similan al la anglaj ideoj “moral of the cavalier” (kavaliraj moroj) aŭ “gentlemanship” (sinjoreca konduto). Nitobe ŝajnis unu el samurajoj vestitaj de eŭropaj jakoj, oni diris, ĉar li amis justecon, fidelecon, honoron kaj devon, kiujn ankaŭ d-ro Zamenhof amis.

Post sia reveno al Japanio, li fariĝis profesoro en kelkaj japanaj universitatoj kaj la unua rektoro en la Tokia Virina Kolegio – la unua kristana virina kolegio en Japanio, kiun li fondis. Li estis tre eminenta edukisto, kiu akcentis ami-kiĝon, klopodon, klerigon kaj racion uzante facilajn vortojn.

Kiam la Ligo de Nacioj estis fondita en 1920 por gardi la pacon en la mondo, post la unua mondomilito, li fariĝis la unua vic-ĝenerala sekretario de la Ligo. Li klopodis daŭrigi la mondopacon per la klerigo de la Ligo.

En la sekvanta jaro, 1921, li ĉeestis, kiel oficiala observanto de la Ligo, la 13-an Universalan Kongreson de Esperanto en Prago, kaj subtenis la internacian lingvon, kortuŝita pro la bela amikeco inter la 2561 kongresanoj kaj pro la interna ideo (frateco kaj justeco inter gentoj) de Esperanto.

D-ro Nitobe ekŝiĝis el la Ligo en 1926. Daŭrigante sian porpacan laboron, li fariĝis prezidanto de Esplorokonferenco pri la Pacifika Problemo. En tiu posteno li mortis en 1933 en Kanado.

Ulrich LINS

Universala Esperanto-Asocio

Ĉu lige kun la studoj por la doktoriĝo en Japanio, aŭ lige kun miaj esploroj pri la historio de Esperanto, mi fakte ne memoras kiam unuafoje mi renkontis la nomon de Nitobe. Ĉiukaze mi trovis notinda tiun anon de samuraja familio kiu post la Meizi-revolucio de Japanio estis inter la fruaj akceptintoj kaj disvastigantoj de la okcidenta scio en Japanio. Kaj samtempe li estis peranto de la japana kulturo al la mondo ĉefe per la libro *Bushido*, kiun ankaŭ menciis d-ro Kobayashi.

Oni povas resumi ke Nitobe ĉiam estis tre konscia pri la eksteraj rilatoj de Japanio, pri la loko de Japanio en la mondo. Fakte oni konsideras lin unu el la raraj, veraj internaciistoj de Japanio. Li verkis tre multe en la angla lingvo kaj en la jaro 1972 aperis lia plena verkaro en la angla. Temas pri kvin volumoj kiuj ampleksas po 500 aŭ 600 paĝojn.

La signifo de Nitobe por la Esperanto-movado estas ke li komprenis tre frue la lingvan problemon ĉe Ligo de Nacioj aŭ pli vaste la gravecon de la lingvo por la kreo de tutmonda konscio. Nitobe komprenis la internan ideon, la dinamikon de Esperanto, bone esprimante tion per la vorto ke Esperanto estas la “motoro” de internacia demokratio. Ion similan diris multaj homoj sed gravis ke tion diris tiutempe aziano, do homo ne edukita unuavice en la eŭropa aŭ usona medio. Tamen li estis aziano kiu en Japanio mem estis kategoriata kiel anglema aŭ

usonema. Fakte oni diras ke Nitobe estis unu el la plej bonaj anglalingvaj stilistoj en Japanio. Konsiderante ke jam tiutempe la angla lingvo estis konsiderata internacia lingvo, do la fakto ke tia tre anglema homo subtenis Esperanton estas des pli signifa.

Ne estas tempo resumi la tutan historion de Esperanto ĉe Ligo de Nacioj: vi ĉiuj scias ke la afero ne tre sukcesis, ke fine oni publikigis nur iom nekonkretan simpati-deklaron ĉefe pro tio ke la franca registaro forte kontraŭis subtenon al Esperanto timante malfortiĝon de la franca lingvo. Sed ankaŭ aliaj registaroj ĝuste ne volis ke la Ligo evoluu al institucio de internacia demokratio, eĉ kun Esperanto kiel interkomprenilo de organo superanta naciajn suverenecojn. Oni scias ke la Ligo pli kaj pli malfortiĝis, kaj sekvis la katastrofo: la dua mondmilito.

Nitobe jam en 1926 revenis al Japanio. Je lia foriro el Eŭropo, la estraro de UEA donis al li honoran membrecon en la Asocio, kaj Nitobe poste laboris precipe por pli bona interkompreniĝo inter Japanio kaj Usono. Li spertis la malboniĝon de la rilatoj sed mortis jam en 1933, do kelkajn jarojn antaŭ ol eksplodis la milito inter tiuj du landoj. Oni povas preskaŭ diri aludante al LdN kaj al tiu malboniĝo de la rilatoj inter Japanio kaj Usono, ke tio estas historio de fiaskoj, ke la nomo de Nitobe ankaŭ ligiĝas al gravaj fiaskoj. Ne estas mia tasko nun tuŝi la pliboniĝon de la rilatoj inter Usono kaj Japanio; sed eble estas grave diri ke malgraŭ tiuj fiaskoj la batalo kiun li faris restas aktuala, kaj se temas pri la lingvo ni verŝajne dum tiu ĉi simpozio konvinkiĝos ke multaj el la ideoj de Nitobe restas aktualaj aŭ almenaŭ vojmontraj.